

Johann Wolfgang von Goethe, Rozeto en herbejo	Johann Wolfgang von Goethe, Knab' rozeton vidis li	Johann Wolfgang von Goethe, Roz' sur erikejo	Johann Wolfgang von Goethe, La rozeto
<i>tradukita de Gotthilf Sellin</i>	<i>tradukita de Joachim Gießner</i>	<i>tradukita de Konrad Matheus</i>	<i>tradukita de Ludwig Lazarus Zamenhof</i>
Knab' rozeton vidis li, Vidis en herbejo; Estis juna, bela ĝi, Por ĝin vidi kuris li, Vidis kun ĝojego. Roz', rozeto, ruĝa roz', Rozo en herbejo.	Knab' rozeton vidis li; erikeja floro. Juna, bela estis ĝi. Por admiru kuris li ĝoje kun adoro. Rozo, rozo, ruĝa roz', erikeja floro.	Vidiĝis eta ruĝa roz' de knab', sur erikejo. Ĝi belis en matena ros'. Hastis li al juna ŝos' admiru ĝin kun ĝojego. Ruĝa, ruĝa, ruĝa roz', roz' sur erikejo.	Knabo vidis – jen rozeto Sur la kampo staras; Bela, juna la floreto . . . Vive kuras la knabeto, Ĝojas, miras, flaras. Sur la kampo la rozet' Kiel infanet'.
Diris knab': mi rompos vin, Rozon en herbejo, Diris roz': mi pikos vin, Ĉiam vi memoros min, Mi ne ĝin permesos. Roz', rozeto, ruĝa roz', Rozo en herbejo.	Diris knab': „Mi rompos vin, vi rozeta floro“. Diris roz': „Mi pikos vin, ke vi ne forgesos min, premas min doloro.“ Rozo, rozo, ruĝa roz', erikeja floro.	Diris knab': “Mi rompos vin, rozo sur erikejo.” Diris roz': “Dorn' pikos vin, por ke vi ne forgesu min. Al mi ne estu sufero. Ruĝa, ruĝa, ruĝa roz', roz' sur erikejo.	Knabo diris : « mi el-tiros Belulinon mian »; Floro diris : « vi foriros, – Per pikiloj mi disŝiros Tuj la manon vian ». Sur la kampo la rozet' Kiel infanet'.
Knab' sovaĝa rompĝin, Rozon en herbejo; Kvankam roz' defendis sin, En koler' ĝi pikis lin, Tamen morti devis. Roz', rozeto, ruĝa roz', Rozo en herbejo.	Knab' sovaĝa rompĝin; erikeja floro. Rozo ja defendis sin kaj sufere pikis lin, ne utilis ploro. Rozo, rozo, ruĝa roz', erikeja floro.	Kaj knab' sovaĝa rompĝin, rozon sur erikejo. En defend' roz' pikis lin. Sed ve' kaj aĥ' ne helpis ĝin. Venis sort' sen tolero. Ruĝa, ruĝa, ruĝa roz', roz' sur erikejo.	La sovaĝa knab' ridante La rozeton prenis, – La floreto batalante Sin defendis pikadante, Sed la sorto venis. Sur la kampo la rozet' Kiel infanet'.
...

Traduko de la Germana poemo "Heidenröslein" de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (*1749-08-28 - †1832-03-22) en Esperanton de GOTTHILF SELLIN (*1844-05-18 - †1921-10-09).

Arg-1022-2071 (2014-12-16 16:00:17)

Tiu ĉi poem-traduko troviĝas en http://kantaro.ikso.net/rozeto_en_herbejo.
Tie oni povas aŭdi ankaŭ la melodion.
Pri la tradukinto vidu la retejon http://de.wikipedia.org/wiki/Gotthilf_Sellin.

Traduko de la Germana poemo "Heidenröslein" de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (*1749-08-28 - †1832-03-22) en Esperanton de JOACHIM GIESSNER (*1913-12-23 - †2003-11-25).

Arg-1022-2225 (2014-12-16 16:29:14)

Tiu ĉi kanto-traduko troviĝas en <http://arkivo.esperanto.de/kantoj/kantoj.pdf>.

Traduko de la Germana poemo "Heidenröslein" de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (*1749-08-28 - †1832-03-22) en Esperanton de Konrad Matheus.

Arg-1022-2227 (2014-12-17 13:24:53)

S-ano Konrad Matheus loĝas en Mühlenweg 20, D-33038 Nieheim, Germanio.

Traduko de la Germana poemo "Heidenröslein" de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (*1749-08-28 - †1832-03-22) en Esperanton de LUDWIG LAZARUS ZAMENHOF (Ludoviko Lazaro Zamenhofo, *1859-12-15 - †1917-04-14).

Arg-1022-2070 (2014-05-23 12:25:14)

Tiu ĉi Zamenhofs poem-traduko troviĝas en <http://edu.i-lo.tarnow.pl/esp/lern/librejo/0012/0008.php>.